

Михаил Лермонтов,
La anĝelo

tradukita de Boris Mirski

Kun kanto solena en nokta
ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nu-
boj en rond'
Atentis la himnon de l'
mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga
ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al
granda Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis
al ter',
Al mond' de malĝojo, mi-
zer';
Kaj restis la kanto en juna
anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirin-
da dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant'
de l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

...

Михаил Лермонтов,
Anĝelo

*tradukita de Vasiliĵ Devjat-
nin*

En mezo de nokto, en blua
ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela
anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun'
en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta
kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam
pekantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo
loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj
tera—
Kaj lia laŭdado ne estis mal-
vera.

Animon tre junan en brakoj
li tenis;
En mondo malgaja naskiĝi
ĝi venis.
Kaj sono de l' kanto en juna
animo
Restadis sen vort', sed kun
viva estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis
premata,
Je revo mirinda pri Di' ple-
nigata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l'
sankta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj
de l' tero.

...

Михаил Лермонтов,
The Angel

tradukita de N. N. 97

At midnight an angel was crossing
the sky,
And quietly he sang;
The moon and the stars and the con-
course of clouds
Paid heed to his heavenly song.

He sang of the bliss of the innocent
souls
In heavenly gardens above;
Of almighty God he sang out, and
his praise
Was pure and sincere.

He bore in his arms a young soul
To our valley of sorrow and tears;
The young soul remembered the hea-
venly song
So vivid and yet without words.

And long did it struggle on earth,
With wondrous desire imbued;
But none of the tedious songs of our
earth
Could rival celestial song.

...

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (*1862 – †1938).*

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la [vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin).

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Anglan de N. N. 97.*

Arg-1039-2111 (2014-06-03 11:29:07)

Tiu ĉi laŭvorta poem-angligo troviĝas en <http://max.mmlc.northwestern.edu/~mdenner/Demo/texts/angel.html>.